



## KEA 36: Atingoj kaj defioj

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

En la sidejo de Kuba Esperanto-Asocio ni parolas kun la prezidanto, Alberto FERNÁNDEZ-CALIENTES BARRIOS, okaze de la 36-a fondodatreveno de la Asocio. Ni ŝatus scii pri tio kion vi konsideras ĉefaj atingoj de KEA kaj ankaŭ pri la defioj nuntempaj.

**AFC:** KEA ĵus fariĝis 36-jara, aĝo kiu signas maturecon kaj ni vivas ĝin meze de la laboroj de nia Asocio, kiu dum multaj jaroj ĉefe pritraktis dum kunsidoj, kongresoj kaj aliaj eventoj, la tri kernajn, ŝlosilajn demandojn de la E-movado, nome informado, unuavice, instruado kaj praktika uzo de la lingvo. Almenaŭ en la unuaj du partoj ni havas grandajn atingojn, ĉar en tiu ĉi momento Esperanto ne dependas de du aŭ tri homoj aŭ de du aŭ tri iniciatoj, ni havas kursojn en diversaj partoj de la lando kaj en tre diversaj formoj. Ekzistas kursoj ekspresaj por homoj kiuj apenaŭ havas liberan tempon aŭ dum semajnofinoj, ankaŭ korespondaj kursoj, retroŝtaj kursoj; kaj ni rimarkas ke ĉiam venas novaj interesitoj kaj homoj, kiuj tre rapide ekposedas la lingvon, eĉ se ili lernas memstare kaj tiam, ili povas plialtigi la lingvonivelon en nia Sidejo, ĉirkaŭ la ekzistantaj eblecoj de aranĝoj kaj kursoj; al tio ni aldonu la lastatempan emfazon pri la ekzamenoj de KEA, baza kaj meza niveloj, tio estas maniero prepari sin por la ekzamenoj de UEA/ILEI aŭ la KER-ekzamenoj. En la lastaj aranĝoj tutlandaj ni vidis ke homoj komprenis, ke ni devas ekzameniĝi, ke dependas de ni mem altigi la lingvokapablon. Kaj aliflanke, inter la defioj ni pretus



diri, ke mankas literaturo, ĉar multaj kubanoj ankoraŭ ne havas eblecojn aliri la reton, kaj ni ankoraŭ estas tre dependaj de la paperaj eldonoj, do, tio estas unu el la ĉefaj mankoj. Ni memoras ke antaŭe venis ĉiusemajne amaso da gazetoj, periodaĵoj, libroj, kaj tiuj gazetoj iris de mano al mano kaj multaj homoj legis la saman numeron de gazeto kaj eĉ pridiskutis temojn aperintajn tie. Hodiaŭ multaj gazetoj parte malaperis kaj la Esperanto-movado fariĝis pli reta kaj la ĉeesto de diskutoj primovadaj okazas en la reto kaj tiam homoj sen retaliro restas iom for de la fluoj de la nuna mondo. Ni havas grandajn esperojn pri tio ke en la venontaj unu-du jaroj, kubanoj ankaŭ

disponu pri la ebleco havi retkonekton kaj tiam ni povas jam prognozi grandan kreskon kvalitan ankaŭ en la kuba movado.

**MG:** Ni volas emfazi gravan momenton venontan post kelkaj monatoj, temas pri tutlanda evento, ĉu vi povas informi aŭ eĉ inviti?

**AFC:** De la 18-a ĝis la 22-a de novembro ĉi-jare okazos en Havano la 6-a Kongreso de KEA. Ĝi estas evento ne nur kuba. Tial, ni esperas pri la partopreno de esperantistoj eksterlandaj, kiuj donas tiun etoson de internacieco al la evento. Ni havas la planon okazigi ne nur laborajn sesiojn, diskutojn, atelierojn, ekzamenojn, estas ankaŭ plano pri ekskursoj, plano pri Lingvistika Simpozio kun la partopreno de kubaj lingvistoj, kaj laste sed ne malplej grave, okazos AMO-seminario de UEA por niaj aktivuloj. Fakte ekzistas la nomlisto de tiuj aktivuloj posedantaj altan lingvan nivelon, kiuj povus ne nur bone pritrakti la temojn tuŝotajn, sed ankaŭ poste multoblige la spertojn akiritajn tie. Do, ni havas kongreson tutlandan kaj kun internacia partopreno ĉe la Nacia Unuiĝo de Arkitektoj kaj Konstruĝingeneroj, kiu havas belegan sidejon kun granda teatro kaj multaj salonoj, situanta tre centre en la moderna parto de Havano, facile atingebla per la publikaj transportiloj kaj ni esperas havi inter ni la partoprenon de eksterlandaj geamikoj por subteni la agadon de KEA dum tiuj ĉi lastaj 36 jaroj.

**MG:** Jen invito al ĉiuj geamikoj tra la mondo veni al Kubo por gustumi la amikan etoson de la insula esperantistaro!

### Lingvoinstruistoj por pli bonaj lecionoj

La 29-an kaj 30-an de majo, lingvoinstruistoj de la tuta lando renkontiĝis en la Havana Pedagogia Universitato por okazigi la tradician renkontiĝon “Lingvoinstruistoj por pli bonaj lecionoj”. Tiu ĉi evento okazas ĉiun duan jaron kaj ĝi celas la interŝanĝon de sciencaj laboraĵoj kaj spertoj rilate lingvoinstruadon. Pli ol 90 instrufakuloj kaj 30 studentoj laborkunsidis en ok komisionoj kie pluraj partoprenantoj prezentis siajn sciencajn esplorojn. Oni aŭdis la voĉojn de kubaj esperantistoj en du laborkomisionoj pere de la prelegoj de la studento Ariadna GARCÍA GUTIÉRREZ kaj la profesoro Julián HERNÁNDEZ ANGULO kiuj prelegis pri “Esperanto kiel gepatra lingvo: alternativo por lingvolernado” kaj pri “Instruado de Esperanto al infanoj pere de kantoj”, respektive. Ankaŭ okazis kvar atelieroj sub la temoj: “Intensa legado de literaturaj tekstoj”, “Pozitiva reago kaj evoluigo de la skriba kapablo”, “Survoje al metodologio por ellabori

didaktikajn materialojn por la fremdlingva leciono”, “Evoluigo de profesiaj kapabloj ekde interkulturaj perspektivoj”. Esperanto ankaŭ aŭdiĝis dum la diskutforumo dediĉita al la “Graveco de la leksiko en la instruado de la portugala, la franca, la rusa kaj Esperanto” pere de eta disertacio de Vilhelmo LUTERMANO.

Membroj de tri sciencaj katedroj nome, Rosa ANTICH pri Lingvoinstrua Didaktiko, Kanadaj Studoj Le Moyne D'Iberbille kaj Karibiaj Studoj ankaŭ kunsidis. Kelkaj afiŝoj pri sciencaj esploroj ornamis unu el la ĉefaj haloj de la Fremdlingva Fakultato.

Je la fermo de la renkontiĝo, Ariadna GARCÍA GUTIÉRREZ kaj Guillermo SÁNCHEZ CORDERO, ekskantisto de “Amindaj”, prezentis sian arton per du belaj esperantigitaj kantoj “Venu nun la Espero” (Venga la Esperanza) kaj “Kubo, belega Kubo” (Cuba, qué linda es Cuba).

Estraranoj de Kuba E-Asocio Pedro FERNÁNDEZ RODRÍGUEZ kaj Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ ankaŭ partoprenis la eventon. Certe la kuba lingvoinstrua komunumo havis la ŝancon iom pli alproksimiĝi al la internacia lingvo kaj konatiĝi kun ĝi. / Julián HERNÁNDEZ

## Granma: 36 jaroj da Espero

Anyer R. MONTERO RAMOS

### Junulara kunsido

Omaĝe al la 36-a Datreveno de Kuba Esperanto-Asocio, la esperantistoj de la Esperanto-Filio en Granma festis la okazaĵon per pluraj aranĝoj en kelkaj partoj de la urbo Bayamo.

La gejunuloj kunsidis en la sidejo de la Filio dum la unua junulara rekontiĝo kie Daniel CAÑETE, reprezentanto de KEJO en la provinco, analizis kun ili la laboron de la Sekcio dum la periodo kaj la novan strategion por la dua jarduono.

La gejunuloj esprimis siajn volon labori por la evoluo de la movado en la provinco, ĉefe en la municipo Niquero, informis pri sia agado en la radio, televido kaj la grafika propagando en la municipoj Media Luna kaj Pilón. Poste la junularo tostis per teo kun kuko.

### Omaĝo kaj tosto

Alia speciala momento estis la renkontiĝo kun la esperantistoj kiuj volontulis okaze de la Librofoiro okazinta dum la pasinta marto, kiuj renkontiĝis en la trinkejo 500 kie Anyer R. MONTERO RAMOS, alparolis nome de la filio pri la serioza laboro plenumita dum tiu grava kultura evento en la provinco kie oni sukcesis vendi kelkajn librojn kaj disvastigi la agadon de la Asocio. Oni tostis kaj ĝuis amikan etoson kaj bondeziris al la Filio de KEA okaze de la nova fondo-datreveno.

En alia momento li elstarigis la fratecan rilaton de la Filio kun la Stokholma Klubo de Esperanto, kaj montris kiel oni povas rilatiĝi kun geamikoj tutmonde. Li aparte menciis la helpemon de s-ro Ingvær Enghardt favore al la Filio kaj salutis ĉiujn geamikojn kiuj subtenas la movadon kaj la Asocio.



## Holguín: evento kultura “Martí inter ni”

De la 14-a ĝis 16-a de majo okazis en Holguín la 1-a esperantista renkontiĝo “Martí inter ni” organizita de la socikultura projekto Bona Amiko, okaze de la 120-a Datreveno de la forpaso de la Nacia Heroo José Martí kaj la 25-a Datreveno de la 75-a UK en Kubo.

La eventon auspiciis KEA, la Kultura Asocio José Martí, la Universitato Oscar Lucero Moya kaj la Municipa Direkcio de Kulturo de la urbo Holguín. La celo estis disvastigi en Esperanto la valorojn kaj verkaron de Martí.

La programo inkluzivis teoriajn sesiojn, kulturen interŝanĝon kaj vizitojn al historiaj kaj turismaj centroj. Partoprenis 30 geesperantistoj el 6 provincoj, nome Guantánamo, Santiago de Cuba, Granma, Las Tunas, La Habana kaj Holguín plus 20 gestudentoj kaj profesoroj de la universitato, kiu estis la sidejo de la evento. Nome de KEA partoprenis Juan Ramón RODRÍGUEZ GÓMEZ, estrano kaj historiisto de la Asocio, kiu esprimis sian kontenton kaj miron pri la bona organiza laboro de la grupo de Holguín kaj tre speciale de Isnel PUPO PEÑA, kultura faciliganto de la provinco kaj motoro de la E-movado en Holguín. Gratulojn al la organizintoj! / M. GUTIÉRREZ (el la raporto de J. Ramón RODRÍGUEZ). Foto: Carlos RAMÓN MORALES.

## Ruĝa kruco kaj Esperanto

Landy ACOSTA PERDOMO

Post kunordigo inter la Junulara Sekcio de KEA, KEJO kaj la provinca sidejo de la Ruĝa Kruco (RK) de Havano ni organizis bazan kurson pri sukuro. Ĝi okazis en la Nacia Sidejo de KEA dum kelkaj semajnoj. La kurson partoprenis 6 esperantistoj havanaj kaj tiel estis kreita Loka Grupo de la Ruĝa Kruco en KEA.

Estis sciite ke ni jam havas veteranan ruĝkruaciston kiu ankaŭ estas esperantisto. Interalie ni organizis aranĝon ĉe la plaĝo Marazul kie ni profitis la okazon praktiki kaj informi pri la Ruĝa Kruco kaj Esperanto. Krome pluraj el ni partoprenis en speciala prelego pro la tago de la Ruĝa Kruco en la Kuba Asocio de Unuiĝintaj Nacioj) kie ni vidigis Esperanton. Pro la intereso inter la membroj de la RK nun ni organizas Esperanto-kurson por septembro en la Sidejo de la RK.



## La Librofoiro en Guantánamo

Kiel kutime, la grupo de KEA en Guantánamo aktive partoprenis en la Internacia Librofoiro 2015 okazinta de la 8-a ĝis la 12-a de aprilo, en la ekspozicia salono de Guantánamo.

Dum tri tagoj ni kaptis la okazon por montri al la publiko la evoluon de Esperanto en nia provinco kaj en Kubo. Pere de prelegoj, ekspozicioj, propagandiloj, (murgazete kaj ciferece) interalie. Disdonado de informiloj al la publiko kaj informprelegeto estis ankaŭ parto de la informa agado. Ni esperas ke nia grupo kreskos per la laboro farita de la gvidantoj kaj la geesperantistoj kiuj ĉeestis dum tiu grava evento.



## Tra la spuroj de niaj klasikuloj

**H**odiaŭ ni dediĉos nian rubrikon al la homo kiu iniciatis la konkretigon de la Zamenhofa ideo, tio estas, praktiki solidarecon kaj krei amikajn ligojn inter malsamaj gentoj pere de tegmenta organizo, nome, Universala Esperanto-Asocio, fondita la 28-an de aprilo 1908.

Hector Hodler estas samaĝulo de Esperanto. Li naskiĝis la 1-an de oktobro 1887 en Ĝenevo kiel filo de la poste famiĝonta svisa pentristo Ferdinand HODLER kaj de ties amatino Augustine DUPIN, unu el la modeloj de la pentristo kaj kudristino.

Post la fino de la baza lernejo (1894-1900), la junulo daŭrigis la studojn en la liceo “Kolegio de Ĝenevo”; li elstaris kiel lernanto, sed en 1907 li ne faris la studfinan ekzamenon, ĉar li ne planis studi en universitato. Danke al la financa helpo de la patro la dudekjara Hector dediĉis sin plentempe kaj ekskluzive al Esperanto kiel redaktoro, ĵurnalisto kaj organizanto.

Fine de 1906 li aĉetis ĉe Paul BERTHELOT ties revuon *Esperanto* kaj ekde februaro 1907 ĝis sia morto redaktis ĝin.

Dum la unua eldonjaro Hodler publikigis plurajn artikolojn pri la neceso fondi internacian asocion ne por propagandi Esperanton kiel la estontan internacian lingvon aŭ diskuti la lingvajn aferojn (tiam komenciĝis la Ido-skismo), sed por senprokraste uzi ĝin en diversaj sferoj de la vivo.

Fine de 1907 HODLER kun CARLES, MEYER kaj Th. ROUSSEAU kompilis kaj eldonis la broŝuron *Konsuloj kaj Esperanto-oficejoj*, kiu baldaŭ (la 28-an de aprilo 1908) kondukis al la fondo de UEA kun *Esperanto* kiel la oficiala organo (sed plu propraĵo de HODLER).

Hodler kune kun la sekretario de UEA Hans JAKOB organizis servon de UEA, kiu ebligis peradon de korespondajoj inter la militantaj



blokoj tra Svislando, serĉadon de homoj kaj montransendon. La faritaj servoj atingis 200 mil. Kiel Kristnaskan donacon UEA aŭtune 1916 sendis al militkaptitaj esperantistoj pakojn kun nutraĵoj, tabako kaj libroj en Esperanto. Tio alte levis la prestiĝon de UEA, kiu post la milito restis la plej aktiva esperantista asocio.

Hodler mortis pro tuberkulozo la 31-an de marto 1920 en la montara kuracloko Leysin, kantono Vaŭdo.

Kun la konsento de sia edzino Émilie HODLER-RUCH, HODLER testamentis grandan monsumon, la revuon *Esperanto* kaj sian bibliotekon al UEA, kies biblioteko havas nun lian nomon. Ĉe UEA funkcias Instituto Hodler '68 por financi movadajn projektojn el la kaptala rento de UEA. En 1920 aperis lia biografio, verkita de Stettler, represita en 1928 kune kun elektitaj artikoloj de HODLER, aperintaj en Esperanto. / Kompilis: M. GUTIÉRREZ

Ĉi tiu artikolo estas verkita surbaze de la artikolo de Aleksander KORJENKOV pri Hector HODLER en la enciklopedia projekto *Nia Diligenta Kolegaro* (NDK).

## Kiel trakti la misajn verojn de aliaj

Stefan MACGILL (Nov-Zelando-Hungario, estrarano de UEA)

Ni verŝajne ĉiuj aŭdis: “Ho, en la mondo, ĉiu parolas la anglan.” Ofte temas pri tio, ke la dirantoj mem ne havas internaciajn komunik-bezonojn, aŭ jam trovis solvon por ili per la angla. En aliaj kazoj, temas simple pri ripetado de “komuna saĝo” sen bazo en la propraj spertoj.



Evidente, la aserto estas falsa – ne ĉiu en la mondo definitive kaj pruveble parolas la anglan. Krome, multaj homoj havas proprajn spertojn pri ĝia malvereco. Tamen, la dirantoj de tiu fama frazo kutime ne intence mensogas. Anstataŭ kontraŭdiri ilin, ni pli bone strebu kompreni la motivojn kaj kredojn de la parolanto.

Eble ili volas diri, ke “ĉiu eksterlandano kun kiu mi volas rilati, ja parolas la anglan”. Unuopulo ja kapablas trakti ne pli ol kelkmil amikojn, konatojn, kolegojn kaj kontraŭulojn – eĉ se ni aldonas “amikojn” de Facebook. Tiukaze ni povus inviti ilin pensi pri la miliardoj da homoj, kiuj

tute ne uzas la anglan en sia ĉiutaga vivo, sed estas same konindaj kaj aŭskultindaj.

Eble ili volas diri, “mi pene (aŭ senpene) lernis la anglan, kaj aliaj povas fari same”. Ja ekzistas multaj homoj kiuj sukcesis atingi bonan nivelon en la angla, kaj ili ofte ne konscias, ke la lernospertoj de aliaj povas esti tute malsamaj. Ni povus inviti ilin pensi pri la granda diverseco de lernantoj en la mondo, kaj la neverŝajneco, ke unu studobjekto (same kiel matematiko, aŭ literaturo, aŭ sporto) estos same alirebla kaj sukcesa por ĉiuj.

Informado ne devas celi tuj konvinki homojn pri nia vidpunkto. Por bone informi pri Esperanto, kiel ade argumentis Claude PIRON, ni devas kompreni la mensajn sintenojn kaj psikologiajn faktorojn, kiuj influas niajn celatojn. Kaj ofte la unua paŝo estas agnoski tiujn subjektivajn verojn, samtempe celante konsciigi ilin pri la ekzisto de aliaj spertoj kaj vidpunktoj.

(el: *Esperanto*, majo 2015)

## Gutoj el la historio

La 15-an de aprilo 1923 – post reorganizi la landan agadon, kun aparta atento al propagando –, okazis la unua radia Esperanto-disaŭdigo, pere de la radiostacio 2DW (strato Obrapía n-ro 93), nome disertacio de d-ro ALEMÁN RUIZ pri “Bezono de internacia lingvo por radiotelefona komunikado”. Ankaŭ kun la celo plidivastigi Esperanton, de la 31-a de marto ĝis la 6-a de aprilo 1924, la Societo Kuba por la Propagando de Esperanto okazigis Esperantistan Semajnon. Iom poste, inter 1926 kaj 1927, oni instruis la lingvon en la Popola Universitato José Martí kiel parto de la studprogramoj.

Cetere, en la Havana Universitato, la poldevena studento s-ro ELIAS JOHNS (origine JONOVSKI) prezentis, la 14-an de majo 1928, doktorigan disertacion titolitan “El problema de una lengua auxiliar internacional y su solución: el Esperanto” (La problemo de internacia helplingvo kaj ties solvo: Esperanto), kiu ankaŭ aperis libroforme.

**Mia kontribuo al  
Kuba Esperanto-Asocio  
Fráncel BRIEL GIL,  
Havano**



★ Filo de esperantista familio ★ Aktiva membro de KEA ekde 1985 ★ Partoprenis plurajn eventojn internaciajn, IJK kaj UK ★ Rondvojaĝis en Sudameriko por disvastigi Yumeiho-terapijon per Esperanto ★ Membro de Monda Yumeiho-Societo kaj UMEA ★ Preleganto en kubaj kaj internaciaj aranĝoj pri naturkuracado, Yumeiho-terapijo kaj vegetaranismo ★ Nuna vicprezidanto de Yumeiho-Esperanto UNESCO-Klubo ★ Aktive partoprenas tutlandajn eventojn organizatajn de KEA ★

# JuSKA

unulara Somera Komuna Aranĝo

Okazo por kiu sentas sin juna

La Junulara Somera Komuna Aranĝo okazos ĉi jare en **Feriejo Río Jobabo** (Rivero Hobabo), provinco **Las Tunas**, Kubo de la 8-a ĝis la 11-a de oktobro 2015. Granda evento por ĉiu kiu sentas sin juna, kie ni konkuros pri sciigoj pri la esperanta historio, sportoj kaj KEA-Ekzameno.

Dum la kulturaj noktoj ĉiu teamo prezentos dancojn, teatraĵojn, kreaĵojn sur homaj korpoj, poemojn kaj rakontojn.

Dum JuSKA ankaŭ okazos Nacia Junulara Kunsido, aranĝo por Patronoj, ekskurso; diskejo, prezentado de grupoj, ekspozicioj, prelegoj kaj diversitipaj kursoj.

Se vi estas kubano, vi devas esti membro (laŭ via kategorio) por 2015 de KEA.

Sendu vian aliĝon al:

Kuba Esperantista Junulara Organizo (KEJO)  
Asociación Cubana de Esperanto  
Vista Alegre 264  
entre Juan Bruno Zayas y Luz Caballero  
10 de Octubre, La Habana

## 36-a Datreveno: komuna foto en la Nacia Sidejo



Okaze de la 36-a Fondodatreveno de Kuba Esperanto-Asocio, okazis tutlande informa agotago per dissendo de informoj tra diversaj amaskomunikiloj. En la Nacia Sidejo en Havano okazis solena kaj festa renkontiĝo kiun partoprenis ĉ. 60 geesperantistoj. Ni ĝuis kantojn, historian momenton, deklamadon, toston kaj dancadon. Por la okazo ni kundividis kukon kaj bondezirojn je la sano de Kuba Esperanto-Asocio. Foto: Hitchmann POWELL.

Kuba Esperanto-Asocio  
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba  
+53 7 640 4484  
info@esperanto.cu.cu  
www.esperanto.cult.cu

esperanto  
CUBA



6-a Kongreso  
**KUBA ESPERANTO-ASOCIO**  
Havano / 18-22 novembro 2015

Lingvoj kaj kulturoj: identeco en diverseco



**RADIO HAVANO KUBO**  
Kurtondaj kaj retaj elsendoj  
[www.radiohc.cu/eo](http://www.radiohc.cu/eo)



esperanto.cu estas trimonata eldonaĵo por komitatanoj, estraranoj kaj aktivuloj de KEA. Reta versio elŝuteblas de nia retejo [www.esperanto.cult.cu](http://www.esperanto.cult.cu). Redaktis: Maritza GUTIÉRREZ, Alberto F. CALIENES, kaj Javier RAMOS.  
Enpaĝigis: Yodanis MAYOL kaj Alberto F. CALIENES.

esperanto  
CUBA